# TEJO-aktuale: numero 207, 2008-12

### AS 2008: 27.12.2008-04.01.2009 en Liptovský Mikuláš, Slovakio

Ankoraŭ eblas aliĝi al la ĉi-jara Ago-Semajno! Uzu la okazon! Ĉu vi scivolemas pri la programeroj? Legu pli http://tejo.org/eo/node/826

### KODEJO 2008 jam disponeblas!

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) troviĝas jam en la TEJO-retpaĝo. Ni invitas ĉiujn junularajn esperantistajn organizojn plenigi kaj sendi ĝin.

La informojn petatajn en la demandaro TEJO ege bezonas por esti efektiva funkcianta tegmento super internacia reto. Koran dankon pro via kunlaboro! Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/kodejo2008/

### TEJO aktuale translokiĝis

Karaj legantoj,

TEJO-aktuale ne plu estas dissendata de la retlistoj de www.abonu.com, sed de la retlistejo de UEA http://uea.org/retlistoj/. Do se vi volas rekomendi abonon de TEJO aktuale bonvolu sendi la novaj abonantoj al tiu adreso.

Dankon, Julia

Redaktorino de TEJO-aktuale

### IJK 2008 Video de TEJO havebla

Video-resumo pri la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazinta en Szombathely, Hungario, inter la 26a de Julio ĝis la 2a de aŭgusto 2008. Registris Morayma Martinez Mateos, unu el la subvenciitoj de la Fonduso Partoprenu IJK-n. Muntis Roĝener Pavinski. Vidu la video: http://br.youtube.com/watch?v=5oiqS6f8VKw

### Kristnaska kriptogramo

KRIPTOGRAMO: - Plezure mi organizis facilan, interesan, amuzan kaj instruan VORTLUDON. Post la korekta solvo de tiuj difinoj, oni trovas ene de la pli nigraj (reliefaj) kvadratetoj, de supre malsupren, literojn pere de kiuj oni povas formi frazon kiu rilatas al la plej fama spiritgvidanto de la Homaro, kiu estas la “VIRO ALVENINTA EL NAZARETO”. La aŭtoro JOSÉ SARAIVA MATOS, 90-jara brazila esperantisto kaj tutmonda civitano, sincere deziras al la enigm-amantoj, multan sukceson. – BONAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVJARON!!!. Se vi volas havi la kriptogramon, bonvolu kontakti José Saraiva Matos per resgatesaraiva ĉe ig.com.br

### Novaĵoj pri Pasporta Servo

La nova retadreso estas pasportaservo ĉe tejo punkto org. La reta aliĝilo en la retejo de PS ( http://www.tejo.org/ps ) ankaŭ provizore ne funkcias, ĉar ĝi ankoraŭ sendas vin al la malnova retadreso.

Due, blovas freŝa vento tra Pasporta Servo. Dum vi legas tion ĉi, TEJO arde preparas konstruon de nova reta administra sistemo, per kiu eblos pli facile administri la estontajn eldonojn. Tamen, mi ne estos la kompilanto. Post 15 jaroj da kompilado estas bone se juna kaj entuziasma postsekvanto transprenos. Sed plej grave estas ke enkonduko de nova administra sistemo estas perfekta momento por transdono. Postsekvanto havos la eblecon aranĝi

la administran laboron laŭ sia plaĉo.

Se vi interesiĝas labori pri la plej furora eldonaĵo en la Esperanto-mondo, la libro kiun pli ol mil homoj ĉiujare arde atendas, informiĝu ĉe la prezidanto de TEJO (gregor ĉe tejo.org). Nur necesas akurateco, kaj tre fidinda retkonekto. Se vi havas demandojn mi volonte klarigos per persona mesaĝo, sed la nova reta administra sistemo certe multon ŝanĝos kaj faciligos.

Derk Ederveen

### Esperanto kaj Obama

Hej!
Vidu la ttt-ejon www.change.org! Voĉdonu al du gravegaj proponoj pri Esperanto! La 10 plaj voĉ-donataj proponoj iros rekte al OBAMA! <br>
http://www.change.org/ideas/view/introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools Tiu ĉi, por meti Esperanton en usonaj lernejoj! Estas la plej voĉ-donita propono ĝis nun en edukado! <br>
http://www.change.org/ideas/view/global_studies_class_in_school_curriculum kaj tiu ĉi mi kreis - por ke Usonanoj lernu pri la mondo en lernejo. <br>
Kaj estas alia propono, kiu estas por la ttt-ejo mem, poor ke ili traduku la ttt-ejon al esperanto:
http://www.change.org/ideas/view/changecom_going_global <br>
Ĝis, Renata Ventura!!

### Tempo por remembriĝi en TEJO/UEA!

Jam venis la tempo (re)membriĝi en TEJO/UEA por 2009! Profitu de la avantaĝoj, kiujn donas TEJO-membreco kaj ricevu la novan jarlibron kaj novajn numerojn de Kontakto kaj TEJO-tutmonde. Vi havos ankaŭ pli prezfavoran aliÄ�on al diversaj eventoj, inkluzive IJK, IS kaj AS, do hastu!
Vi povas tion rekte fari en la aliĝpaĝo ĉe http://www.uea.org/alighoj/index.html. Bonvolu ankaŭ pludoni ĉi tiun informon al aliaj homoj el viaj landoj! Ni antaŭĝojas vidi vin ĉiujn kiel membrojn en la estontaj renkontiĝoj!
Ĝis baldaŭ! Plej amike
Federico
TEJO-volontulo

### 52a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo (IS), 27.12.2008-03.01.2009 Biedenkopf

La IS estas la plej granda aranĝo de GEJ. Dum silvestro renkontixgas ĉirkaŭ 150 homoj el pli ol 25 landoj en la junulargastejo en Biedenkopf (meza Germanio). IS ofertas al siaj partoprenantoj multflankan teman programon, la temo ĉijare estas "katastrofo". Ĉu vi jam spertis katastrofon? Diversaj prelegoj, laborgrupoj kaj diskutrondoj prilaboras la temon. Krome ofertas distra programo amuzon kaj agrabla tempopasigo inter amikoj. Ĉu vi ŝatas danci aŭ ĉu vi pli ŝatas trovi sekretan trezoron? Legu pli: http://tejo.org/eo/node/832

### Venontaj renkontiĝoj

La Komuna Seminario okazos en Jokohamo (Japanio), la 27-29a de decembro en 2008 http://tejo.org/eo/node/784; E-o "Radionokto" - Januaro 2009 http://tejo.org/eo/node/818; Someraj Kursoj en Aŭstralio, 11a ĝis 25a de januaro 2009 http://tejo.org/eo/node/814; Vintra Folklora Festivalo Malanka - 14an de januaro 2009 en Ukrainio http://tejo.org/eo/node/799; 7a Novjara Renkontiĝo ĉi-jarfine en Frankfurto/Majno, 27a de decembro ĝis 3a de januaro http://tejo.org/eo/node/793;

### AS 2008: 27.12.2008-04.01.2009 en Liptovský Mikuláš, Slovakio

Ankoraŭ eblas aliĝi al la ĉi-jara Ago-Semajno! Uzu la okazon! Ĉu vi scivolemas pri la programeroj? Legu pli http://tejo.org/eo/node/826

### KODEJO 2008 jam disponeblas!

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) troviĝas jam en la TEJO-retpaĝo. Ni invitas ĉiujn junularajn esperantistajn organizojn plenigi kaj sendi ĝin.

La informojn petatajn en la demandaro TEJO ege bezonas por esti efektiva funkcianta tegmento super internacia reto. Koran dankon pro via kunlaboro! Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/kodejo2008/

### TEJO aktuale translokiĝis

Karaj legantoj,

TEJO-aktuale ne plu estas dissendata de la retlistoj de www.abonu.com, sed de la retlistejo de UEA http://uea.org/retlistoj/. Do se vi volas rekomendi abonon de TEJO aktuale bonvolu sendi la novaj abonantoj al tiu adreso.

Dankon, Julia

Redaktorino de TEJO-aktuale

### IJK 2008 Video de TEJO havebla

Video-resumo pri la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazinta en Szombathely, Hungario, inter la 26a de Julio ĝis la 2a de aŭgusto 2008. Registris Morayma Martinez Mateos, unu el la subvenciitoj de la Fonduso Partoprenu IJK-n. Muntis Roĝener Pavinski. Vidu la video: http://br.youtube.com/watch?v=5oiqS6f8VKw

### Kristnaska kriptogramo

KRIPTOGRAMO: - Plezure mi organizis facilan, interesan, amuzan kaj instruan VORTLUDON. Post la korekta solvo de tiuj difinoj, oni trovas ene de la pli nigraj (reliefaj) kvadratetoj, de supre malsupren, literojn pere de kiuj oni povas formi frazon kiu rilatas al la plej fama spiritgvidanto de la Homaro, kiu estas la “VIRO ALVENINTA EL NAZARETO”. La aŭtoro JOSÉ SARAIVA MATOS, 90-jara brazila esperantisto kaj tutmonda civitano, sincere deziras al la enigm-amantoj, multan sukceson. – BONAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVJARON!!!. Se vi volas havi la kriptogramon, bonvolu kontakti José Saraiva Matos per resgatesaraiva ĉe ig.com.br

### Novaĵoj pri Pasporta Servo

La nova retadreso estas pasportaservo ĉe tejo punkto org. La reta aliĝilo en la retejo de PS ( http://www.tejo.org/ps ) ankaŭ provizore ne funkcias, ĉar ĝi ankoraŭ sendas vin al la malnova retadreso.

Due, blovas freŝa vento tra Pasporta Servo. Dum vi legas tion ĉi, TEJO arde preparas konstruon de nova reta administra sistemo, per kiu eblos pli facile administri la estontajn eldonojn. Tamen, mi ne estos la kompilanto. Post 15 jaroj da kompilado estas bone se juna kaj entuziasma postsekvanto transprenos. Sed plej grave estas ke enkonduko de nova administra sistemo estas perfekta momento por transdono. Postsekvanto havos la eblecon aranĝi

la administran laboron laŭ sia plaĉo.

Se vi interesiĝas labori pri la plej furora eldonaĵo en la Esperanto-mondo, la libro kiun pli ol mil homoj ĉiujare arde atendas, informiĝu ĉe la prezidanto de TEJO (gregor ĉe tejo.org). Nur necesas akurateco, kaj tre fidinda retkonekto. Se vi havas demandojn mi volonte klarigos per persona mesaĝo, sed la nova reta administra sistemo certe multon ŝanĝos kaj faciligos.

Derk Ederveen

### Esperanto kaj Obama

Hej!
Vidu la ttt-ejon www.change.org! Voĉdonu al du gravegaj proponoj pri Esperanto! La 10 plaj voĉ-donataj proponoj iros rekte al OBAMA! <br>
http://www.change.org/ideas/view/introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools Tiu ĉi, por meti Esperanton en usonaj lernejoj! Estas la plej voĉ-donita propono ĝis nun en edukado! <br>
http://www.change.org/ideas/view/global_studies_class_in_school_curriculum kaj tiu ĉi mi kreis - por ke Usonanoj lernu pri la mondo en lernejo. <br>
Kaj estas alia propono, kiu estas por la ttt-ejo mem, poor ke ili traduku la ttt-ejon al esperanto:
http://www.change.org/ideas/view/changecom_going_global <br>
Ĝis, Renata Ventura!!

### Tempo por remembriĝi en TEJO/UEA!

Jam venis la tempo (re)membriĝi en TEJO/UEA por 2009! Profitu de la avantaĝoj, kiujn donas TEJO-membreco kaj ricevu la novan jarlibron kaj novajn numerojn de Kontakto kaj TEJO-tutmonde. Vi havos ankaŭ pli prezfavoran aliĂ�on al diversaj eventoj, inkluzive IJK, IS kaj AS, do hastu!
Vi povas tion rekte fari en la aliĝpaĝo ĉe http://www.uea.org/alighoj/index.html. Bonvolu ankaŭ pludoni ĉi tiun informon al aliaj homoj el viaj landoj! Ni antaŭĝojas vidi vin ĉiujn kiel membrojn en la estontaj renkontiĝoj!
Ĝis baldaŭ! Plej amike
Federico
TEJO-volontulo

### 52a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo (IS), 27.12.2008-03.01.2009 Biedenkopf

La IS estas la plej granda aranĝo de GEJ. Dum silvestro renkontixgas ĉirkaŭ 150 homoj el pli ol 25 landoj en la junulargastejo en Biedenkopf (meza Germanio). IS ofertas al siaj partoprenantoj multflankan teman programon, la temo ĉijare estas "katastrofo". Ĉu vi jam spertis katastrofon? Diversaj prelegoj, laborgrupoj kaj diskutrondoj prilaboras la temon. Krome ofertas distra programo amuzon kaj agrabla tempopasigo inter amikoj. Ĉu vi ŝatas danci aŭ ĉu vi pli ŝatas trovi sekretan trezoron? Legu pli: http://tejo.org/eo/node/832

## Venontaj renkontiĝoj

La Komuna Seminario okazos en Jokohamo (Japanio), la 27-29a de decembro en 2008 http://tejo.org/eo/node/784; E-o "Radionokto" - Januaro 2009 http://tejo.org/eo/node/818; Someraj Kursoj en Aŭstralio, 11a ĝis 25a de januaro 2009 http://tejo.org/eo/node/814; Vintra Folklora Festivalo Malanka - 14an de januaro 2009 en Ukrainio http://tejo.org/eo/node/799; 7a Novjara Renkontiĝo ĉi-jarfine en Frankfurto/Majno, 27a de decembro ĝis 3a de januaro http://tejo.org/eo/node/793;